

# Boletín

**Federación Española de Esperanto**

**Asociación de Utilidad Pública**

**6a IESKT**



**N-ro 338 • Noviembre - Diciembre 1998**

# Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Aperanta de 1949

Ĉefredaktoro: Miguel Gutiérrez Adúriz; Los Coterios 1-C, 2-I; ES-39600 Muriadas; Cantabria; liven@nexo.es

Kunlaborantoj: Salvador Gumá, Miguel Fernández, Vicente Hernández, Andrés Martín, Luis Serrano, Antonio Valén, Antonio Marco.

*Noto: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro. La redaktisto rajtas rifuzi ne petitajn artikolojn.*

## Hispana Esperanto-Federacio

Rodríguez San Pedro 13, 3ª, 7;  
ES-28015 Madrid;  
Tel.+faksilo: +34.(9)1.446.80.79  
Konto: 14.011.966, Caja Postal  
admin@esperanto-es.org  
www.esperanto-es.org

## Estraro

Prezidanto: Miguel A. Sancho;  
Vicprezidanto: José M. Galofré;  
Sekretario: Manuel Parra;  
Kasisto: Pedro Garrote;  
Vicsekretario: Marcos Cruz;  
Voĉdonantoj:  
Luis Hernández,  
Augusto Casquero,  
Miguel Gutiérrez.

## Enhavo

Estrarkunsido.....	2
Instruado.....	4
Tri celoj por ILEI ( <i>M. La Torre</i> )	4
Interkulturo ( <i>M. La Torre</i> )....	5
Oni parolas pri ni.....	7
<i>Esperanto Joven (M. Trevisán)</i> ..	7
Niaj Grupoj kaj Asocioj.....	8
Donacoj.....	11
6a IESKT ( <i>A. Marco Botella</i> )..	12
Ĉirkaŭ la mondo.....	14
Akademio de Esperanto:	
Nova Estraro.....	19
Hispana Literaturo: Lorca poezia fenomeno el hispana orepoko ( <i>M. Fernández</i> ).....	20
Olafo.....	25
Lingva angulo: Pri landnomoj kaj inoj ( <i>Antonio Valén</i> )....	26
Kampanjo 2000 de Eurokka .	28
Jarabonoj kaj kotizoj.....	29
Aniĝilo por 1999.....	30
Loĝado (58a HK).....	31
Aliĝilo (58a HK).....	32

## Reklamtarifoj en Boletín

*Pri-esperantaj reklamoj*

Tuta paĝo.....	5.100
Donpaĝo.....	3.100
Kvaronpaĝo.....	2.100

# Estrarkunsido



La HEF-Estraro kunsidis en la centra oficejo de la Asocio la 26an de septembro de 1998 ekde la 10a. Ĉeestis: Miguel Angel Sancho, Pedro Garrote, Manuel Parra, Marcos Cruz, kaj Luis E. Hernández. Ankaŭ partoprenis en la kunsido la konsilantino Ana Manero kaj la kunlaborantino Rafaela Urueña. Salutojn kaj ezkuzojn prezentis la vicprezidanto José M<sup>a</sup> Galofré, la konsilanto José M<sup>a</sup> Rodríguez kaj la redaktoro de Boletín Miguel Gutiérrez.

Pri traktitaj aferoj:

1.- Oni legis kaj aprobis la protokolon de la antaŭa estrarkunsido.

2.- La organizintoj de la lasta HK okazinta en Valadolido raportis: Partoprenis 103 gekongresanoj. La kongresejo estis senpage disponigita de la Urbodomo. La prelegoj montriĝis allogaj, la homoj tre ĝuis la turisman viziton tra la urbo kaj oni ĝenerale kontentis. El la rezulta monprofito HEF ricevis 65.000 ESP. Radiostacio Radio Popular kaj loka televido aperigis informojn kaj intervjuojn.

3.- Formala proceduro por la aprobo de la kontoetato: Prezentiĝis problemoj en rilato al la prezento de la kontoj ĉe "Ministerio del Interior". La kontoj, *aprobitaj de la Ĝenerala Kunsido*, devas esti prezentitaj antaŭ la 1a de julio ĉiujare. Tial do ke la ĜK okazas kutime post tiu dato, la Estraro, konsultinte la konsilanton José M<sup>a</sup> Rodrí-

guez, decidis kunvoki Ĝeneralan Kunsidon en Madrido pere de Boletín en la unua triono de la venonta jaro, kun la nura celo aprobi la kontojn. Tiel ke eblos aprobi kaj prezenti ilin en taŭga tempo.

4.- Informa triptiko: La Estraro ankoraŭ ne ricevis la koncernan informon pri la kostoj de la desegnisto kaj de la presisto. La Prezidanto, s-ro Sancho, montris modelon pri la proksimuma aspekto de la informilo.

5.- Parta investo de nia kapitalo: Reprenante decidojn faritajn antaŭ jaroj, La Sekretario, s-ro Parra proponis apartan investon de parto de la kapitalo (unu miliono da pesetoj) por tiri pli da profito el ĝi. La kasisto, s-ro Garrote okupiĝos pri la temo. La pasintjara decido aĉeti malgrandan fortenejon estas prokrastita, ĉar la nuna kapitalo montriĝis nesufiĉa por la celo.

6.- Pri la broŝuro Pro Esperanto: Ioman ĝenon kaŭzas ankoraŭ la manko de jam pagita fakturo pro la presado de tiu verko.

7.- Kampanjo 2.000 Kiliĥotoj: Malgraŭ ampleksa kampanjo per Interreto kaj ĉiuj e-revuoj, oni ne atingis la deziratan nombron de menditaj ekzempleroj (ĝis nun 403). Tial do Fundación Esperanto, posedanto de la eldono, decidis ĉu liveri aŭ ne tiujn ĝis nun menditajn.

8.- Buĝeto por 1998: Laŭ informo de la kasisto, s-ro Garrote, fine de la jaro antaŭvideblas ioma malgajno pro jenaj kaŭzoj: 1) manko de kotizo de pluraj membroj; 2) malalta vendo de libroj; 3) reaktirota monsumo, fakte subvencio por projekto kiu bedaŭrinde ne plenumiĝis; kaj 4) apero de kelkaj ne antaŭkalkulitaj elspezoj, kiel la eventuala filmado de Boletín por ĝia presado.

9.- Preparo de la buĝeto por 1999: Kelkaj planitaj elspezoj por venonta jaro estas: uzita printilo, 40.000 ESP; plialtigo de la produktad-kosto de Boletín, 110.000 ESP; Expolingua, ĉirkaŭ 400.000 ESP. Unuafoje en 1999 la kontoetato de HEF inkluzivos tiun de la libroservo. La kasisto preparos malneton de la buĝeto kaj en decembro la estraro pristudos ĝin.

10.- Expolingua-99: HEF jam rezervis lokon por starigo de esperanta budo en Expolingia-99. La baza kosto de la budo estas 200.000 ESP, el kiuj duono estas jam pagita; al tio aldonendas luado de mebloj kaj produktado de diversaj informiloj. La 17an de oktobro kunvenos la du Asocioj kunlaborantaj pri ĉi projekto, HEF kaj Madrida E-Liceo, cele al detala distribuado de taskoj.

11.- Aldonvalora imposto: Laŭ sugesto de la kasisto, s-ro Garrote, HEF kontaktos *Haciendan* kun la celo akiri por si la statuson de asocio kun imposta escepto rilate al AVI (h. IVA).

12.- "Fundación Esperanto": Jam ĉiuj patronoj de FE aranĝis sian notarian rajtigiton (lasta estis la prezidanto), nepraj por plenumi la leĝajn devojn. Dume, komisiita de la prezidanto, José M<sup>a</sup> Rodríguez ellaboris tre detalan dokumenton: propono de agadprogramo por 1999, kun malneta



buĝeto kaj aktivaĵoj. Ĝi estis dissendita al ĉiuj patronoj kaj estos pridiskutata en kunsido okazonta antaŭ decembro.

13.- Hispanlingva informado: Konsiderante ke parto de la membraro ne plene regas Esperanton, kaj ke tiuj membroj estas samrajtaj kiel la aliaj, oni konstatas la neceson prezenti en Boletín kelkajn paĝojn hispanlingvajn. Ni esploros la eblon fari tion ekde la 1a numero de 1999. Aliflanke daŭras la regula informado al amasmedioj, prizorgata de Manuel Pancorbo. Tamen, endas longigi la liston de adresatoj.

14.- HEF respondos jese al la cirkulero dissendita de Umberto Brocatelli, cele al la reaktivigo de Eŭropa E-Unio. La reprezentanto de HEF en la kunveno okazonta venontjare en Berlino estos M. Pancorbo.

15.- Eksigitaj membroj: La listo de 47 ŝuldantaj membroj, prezentita en la marta estrarkunsido, intertempe reduktiĝis al 29 rezulte de du senditaj cirkuleroj. La 32 nepagantoj estos eksigitaj en junio.

M. A. Sancho, Prezidanto

M. Parra, sekretario



# Instruado

Kiel dirite en la antaŭa numero de Boletín komeciĝis la rekonstruo de la estrukturo de I.L.E.I en Hispanio, cele al antaŭenigo de la E-instruado kaj la preparado de profesoroj tiucele.

Jam pluraj e-aj instruistoj respondis la alvokon de s-ro Augusto Casquero, HEF-estrarano pri instruado: José Francisco Martín

del Pozo, Miguel García Iturrioz, Juan Antonio Giménez Miguel Gutiérrez, Ana Manero...

Kompreneble necesas la aliĝo de kiel eble plej multe da esperantistoj kun rekta rilato al la instruado, inkluzive de esperantistoj instruantaj en Grupoj kaj Asocioj. La projekto ĵus prezentita de la nova ILEI-Prezidanto, la italo Mauro La Torre, sendube estas alloga kaj efektivebla. Ju pli multaj kunlaboros en la projekto, des pli bone. Memoru: unueco donas forton.

La HEF-Estrarano

---

## Tri celoj por ILEI

---

### Mauro La Torre

---

Ĵus elektita en la estraro, mi komencis cerbumi, kion plej urĝe fari por revigligi la asocion. Dum ĉiuj estraranoj planas la farenadojn en sia specifa agokampo (instruistoj kaj lernejoj, komunikiloj, lerniloj, ekzamenoj kaj konkursoj, klerigado kaj trejnado, konferencoj kaj E-gimnazio, interlernejaj projektoj, terminara agado, fi-

nancoj, reprezentado), mi volas rapide profiti la lastan redaktan tempon de la revuo, por saluti vin kaj tuj esprimi al vi mian principan proponon, pri kiuj estu la fonaj celoj de nia estonta agado.

Kiel diras ĝia nomo, ILEI (la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) kunligas mondscale la instruistojn, kiuj subtenas novan lingvan ordon, bazitan sur planlingvo Esperanto. Sed kion konkrete celas ĉi tiu Ligo? Ni menciŭ tri unuarangajn celojn, kiujn ĝi havu, laŭ ordo de kreskanta grandeco.

## Unua celo

Disaj tra la kontinentoj troviĝas kelkdeko da lernejoj, kie oni —regule aŭ escepte— instruas Esperanton. Ili ne estas multaj, sed ili simbolas kaj elprovas nian strebadon. Do nia unua minimuma celo estu subteni tiujn instruistojn, kiuj apenaŭ pretervivas kontraŭ ĉiaj malfacilaĵoj (antaŭjuĝoj, manko de rimedoj, izoliteco, ktp.).

## Dua celo

Krom la ĵus menciita avangardo, ekzistas multaj centoj da aliaj instruistoj (eĉ miloj), kiuj kvankam ili estas ja por uzo kaj disvastigo de la Internacia Lingvo, tamen pro diversaj kialoj ne havas la eblecon mem instrui la lingvon en siaj lernejoj.

Mi kredas ke nia dua plej grava celo estas helpi almenaŭ parton de ĉi tiuj esperantanoj, iel enkonduki la lingvon en siaj labormedioj, se ne per regula enklasa instruado, almenaŭ per informaj prelegoj aŭ per interlerneja kunlaborado helpe de Esperanto.

Jam ĉi tiu dua celo (atingi kaj helpi ĉiujn esperantistajn instruistojn) estas sufiĉe impona kaj defia por niaj asociaj fortoj, ĉar la E-favoraj instruistoj ekster ILEI estas treege pli multaj ol la ILEI-anoj. (Aliflanke, se ni ne alfrontos ĉi tiun problemon, ni restos nura klubo, kiu aranĝas mondajn konferencojn por... 50 partoprenantoj!)

## Tria celo

La tria labornivelo —la plej malfacila— estas la dezirinda eliro el la nunaj limoj de E-movado, por kunlabori kun aliaj instruistaj asocioj (ekzemple de lin-

gvo-instruistoj) kaj kun la instancoj, kiuj okupiĝas pri eduko kaj klerigo (Unesko, landaj instru-ministerioj, porinstruistaj altlernejoj, ktp.).

## Konklude

Neniu pensas ke la diritaj celoj povas esti plenumotaj morgaŭ. Sed ĉu ne eblas —jam ekde morgaŭ— kompari niajn fortojn kaj planojn kun tiuj celoj? Aŭ por la ceteraj jam planitaj celetoj kaj celegoj, ni ne provu hierarkiigi ilin laŭ graveca kaj urĝeca ordo?

Nu, por komenci, ni provu —ĉiu en sia lando aŭ regiono— esplori la situacion rilate la diritajn tri celoj:

1. en kiuj klasoj (ĉe ni) oni iel instruas E-on aŭ iel laboras pri ĝi?

2. kiel trovi (aŭ kompili) liston de instruistoj de nia regiono, kiuj estas esperantanoj?

3. kiuj profesiaj asocioj aŭ sociaj instancoj en nia medio havas celojn, kiuj kongruas (almenaŭ parte) kun tiuj de ILEI?

Bonvolu sendi al ni viajn respondojn aŭ proponi viajn kromajn problemojn, kaj... bonan laboron por la kominciĝanta lernojar!

## INTERKULTURO

ILEI pretigas internacian edukprojekton nomatan "Interkulturo", kunlabore kun UEA, en la kadra programo Unesko/Linguapax. La ideo de la edukprojekto estas lanĉita en la ĉi-somera simpozio—kolokvo "Esperanto en lernejoj" dum la Universala Kongreso en Montpeliero.

Pri la fonaj problemoj, kulturaj kaj pedagogiaj, kiuj inspiris "Interkulturo-n" vi

povas legi en la nun aperanta numero de IPR (Internacia Pedagogia Revuo) 1998/n.3.

Ĉi tie mi resumas nur la esencajn trajtojn de la projekto: jen ili.

1. Celo: kontribui konkrete al interkultura edukado en lernejoj.

2. Partoprenantoj: klasoj de bazaj aŭ mezaj lernejoj en diversaj landoj kaj kontinentoj (aŭ lernejoj esperanto-kluboj).

3. Agadoj (en la klasoj aŭ kluboj):

3.1 uzo de geografia sliparo pri landoj kaj regionoj (ĉiun slipon verkos instruistoj de la koncerna lando), por komparado de landoj kaj kulturoj;

3.2 elekto de laborkampoj (ekz.: manĝado, vestado, komunikado,

lingvoj, lernejoj, ktp.), pri kiuj la klasoj interŝanĝos materiajn dokumentojn kaj kolektos pluajn informojn;

3.3 ekspluatado de aliaj taŭgaj ekzistantaj lernomaterialoj pri alies vivmanieroj kaj kulturoj;

3.3 lernado de esperanto por realigi la suprajn agadojn;

3.4 produktado de finaj materialoj (tekstoj, grafikaĵoj, bildoj,

sonbendoj) pri la studitaj temoj, por internacia ekspozicio.

4. Komunik-kanaloj: en la komputila monda Interreto, ILEI kreas medion, nomata Kvazaŭna Lernejo (= Virtuala Lernejo), kies klasoj estos la klasoj de la projekto Interkulturo, disaj tra la mondo. En tiu Interreta medio, la klasoj povos konsulti lernomaterialojn, ekzerciĝi en la lingvo (esperanto), komuniki inter si, ekspozicii siajn produktaĵojn, ktp.

4.1 por tiuj lernejoj, kiuj jam havas aliron al Interreto, ili povos rekte uzi la

sistemon, elprenante kaj almetante materialojn.

4.2 por tiuj klasoj kiuj nun ankoraŭ ne havas tiajn eblecojn, ILEI provizus paperajn kopiojn, sendataj per tradicia papera poŝto. Krome, oni esploras la eblecojn helpi la lernejojn enretiĝi.

La projekto estis diskutata en UK kaj dum ILEI-konferenco en Montpeliero, kie kelkaj klas-instruistoj kaj/aŭ landaj ILEI-representantoj montris sian principan intereson partopreni en la afero. Nun venas la momento ekrealigi la projekton, pretigante la ilojn kaj organizante la lernejojn.

### **Kion vi povas fari konkrete?**

1. Esplori ĉu en via lando troviĝas bazlernejaj (aŭ mezlernejaj) klasoj, kiuj volas partopreni en la edukprojekto Interkulturo (ekde la venonta lernojararo).

2. Esplori ĉu troviĝas instruistoj, kiuj volas kunlabori en la pretigo kaj/aŭ elekto de interkulturaj materialoj (ekz. kontribui al la landa sliparo, kaj diskuti pri la laborproponoj por la klasoj).

3. Esplori pri la ebleco ke via nacia Unesco-komisiono aŭspiciu la projekton (ekz. tion la itala Nacia Komisiono jam faris); se vi bezonas ni povas sendi ekzemplan peton.

4. Eventuale trovi kunlaboremuloj por la organizaj aŭ interretaj aspektoj.

Por atingi la suprajn celojn, vi povas uzi ĉiajn rimedojn kaj vojojn; interlalie ni konsilas:

a) se vi havas ILEI-sekcian bultenon kaj/aŭ landan esperanto-gazeton, vi povas verki alvokan artikoleon por informi kaj inviti la interesatojn por la projekto.

b) tuj senpere kontakti la homojn, kiuj verŝajne povas kunlabori

c) kontakti pri ĉi tiu propono la estraron de via landa asocio de UEA, aŭ ties eventuala respondenculo pri instruado, kiu ankaŭ ricevos de UEA cirkulaĵon pri tio.

d) fine, se vi havas kontaktojn kun nacia asocio de lingvoinstruistoj, ankaŭ al ili vi povas sendi informan inviton pri la projekto Interkulturo.

Mauro La Torre, ILEI-prezidanto



7

## Oni parolas pri ni

Aperis informo pri HEF en eldonaĵo aperinta en septembro-1998 nomata "Guía Ciudades, Cultura y Ocio — Ajoblanco". Ĝi havas 210 paĝojn kaj kostas 850 pesetojn. Ĝia enkonduko asertas "esta Guía Ajoblanco es una invitación a la interrelación entre personas y al intercambio de propuestas insólitas." La recenzo pri HEF, senpaga kaj ne sendita de la asocio, aperas sub epigrafo "colectivos contracorriente", kaj tekstas jene:

"Federación Española de Esperanto A partir de la Federación puedes ponerte en contacto con quienes ya hablan esta lengua, consultar libros de texto, acceder a cursos por correspondencia y, a través del ordenador, participar en encuentros con esperantistas de todo el mundo, viajar por más de 60 países y conocer gente nueva usando el esperanto como vehículo de comunicación..." [sekvas la adreso]

De kie ili ricevis tiun informon? Plej verŝajne el nia paĝoj en Internet. Bona investo, ĉu ne?

Manolo Parra

## Esperanto Joven


La 3an de oktobro de 1998 okazis la dua kunveno de *Esperanto Joven*, grupo konsistanta el pluraj junuloj. Ni parolis pri propagando, projektoj kaj kurseto por gejunuloj. Ankaŭ oni decidis ke Marco Trevisán (supra foto) okupiĝos pri la reta informado de la sekcio.

Tiel, ni konkludis, ke la plej bona formato por la revueto estus DIN A4. Ankaŭ ni pensis, ke estus bone sendi ĉiun artikolon al Kontakto kaj al Koncize. Tamen, ni ankoraŭ ne elektis redaktoron, sed eble ni tion faros en la venonta kunveno. Oni pensas, ke estas pli bone organiziĝi antaŭ ol fari ion. Pri la kurseto por gejunuloj, oni ne tre longe parolis, kaj oni ne alvenis al definitiva konkludo.

Pri informado oni decidis enmeti anoncojn pri esperanto kaj pri E-lernolibroj sur la montrotabulojn de ĉiu madrida biblioteko, kaj, post interkonsento, kun eksterloĝantoj en nemadridaj bibliotekoj. Tial, oni asignos kvar aŭ kvin bibliotekojn al ĉiu ano de Esperanto Joven. Plia kunveno okazos la 17an de oktobro, matene, en la HEF-ejo.

Marco Trevisán





# Niaj Grupoj kaj Asocioj

## Andaluzio

# Anoj de AEU kunvenis la pasintan 17an de oktobro por Ĝenerala Kunsido, kiu okazis en la *Centro Cívico* de Malago.

Inter multaj aferoj pritrakitaj estis jenaj:

1. La prezidanto informis pri la bilanco, kiu jam aperis en la organoj de la revuo kaj estis aprobita. Ĝenerale oni konsideris la kotizon tre modesta, kaj proponis altigon. Por la jaro 1998 la kotizo estos 2100 pesetoj (12,50 eŭroj).

2. La kursoj bezonas pli da lernantoj, speciale la meza. Por havigi iom pli da intereso, oni aprobis, ke la ttt-ejo de AEU havu interaktivajn ekzercojn, komence pri la meza kurso, poste pri la komenca. Laŭplane, la unua paŝo estos preta antaŭ la fino de 1998.

3. La prezidanto informis pri la projekto donaci E-librojn al andaluzaj bibliotekoj. Dum 1997, 20 kordovaj bibliotekoj ricevis la lernolibron de M. G. Adúriz (krom la filologia fakultato, kiu ricevis tiun de de Diego). Laŭ la projekto, la vico dum 1998 estos por la jaenaj bibliotekoj. La problemo estas, ke oni ankoraŭ ne atingis de oficialaj instancoj informojn pri la jaena bibliotekreto. Kiel anstataŭa plano oni decidis, ke se daŭre mankos informoj, ĉi-jare ricevos librojn sevilaj bibliotekoj.

4. Radio. La respondeculoj pri la projekto skribe informis pri la demarŝoj. Ŝajnas, ke la respondeculoj de la radio kontaktita estas favoraj al la projekto, tamen la demarŝoj tiom multas, ke la afero estos necerta dum ankoraŭ kelkaj monatoj. Tial oni komisiis la vicprezidanton de AEU, José F. Martín, komenci interretajn elsendojn, tute esperantajn, kiel eble plej baldaŭ, ĉiuokaze antaŭ la fino de la jaro 1998.

5. Eldona projekto. AEU eldonos broŝurforme la verkon "Plutoso". Temas pri verko de la helena teatriŝto Aristofano, kiu jam aperis en 1906, traduke de Dro E. Noël. La verkon prizorgis José F. Martín, kiu rekompostis ĝin kaj verkis studeton pri la aŭtoro, pri la tradukanto kaj pri la verko.

6. AEU studos la eblon disvendi T-ĉemizojn kun E-anagramo dum la printempo 1999. Oni aprobis disvolvi la projekton nur se troviĝos sufiĉe da eblecoj vendi almenaŭ 200.

7. Kiel fina punkto, la estraro jam finis sian du-jaran periodon. Manke de novaj kandidatoj, Ĝi restos en sia posteno ĝis oktobro de la jaro 2000: Prezidanto, Andrés Martín; Vicprezidanto, José F. Martín; Sekretario, Jesús García; Kasisto, Julio Herrero; Voĉdonanto, José María Rodríguez.

José F. Martín

## Aragono

# En septembro okazis estrarkunveno en la rondo Frateco de Zaragozo, en kiu oni analizis la delikatan ekonomian situacion de la Asocio. Oni pristudis diversajn solvojn. Unu el ili eble definitiva. Por momente iom mildigi la problemon, oni aĉetis la tradician kristnaskan loterion, kies numero estas 24.262. De nun ĝi estas je la dispono de la hispana esperantistaro.

En la kunveno oni ankaŭ planis la organizon de du e-kursoj: unu elementa kaj alia perfektiga por progresantoj, kiel ĉiujare. La kursojn oni anoncos en la lokaj ĵurnaloj.

# En decembro, okaze de la 90-jara datreveno de la fondo de Frateco, la Asocio organizos prelegon kaj la kutiman komunan vespermanĝon, kies detaloj oni oportune anoncos.

A.M.B.

## Asturio

# En la ĵurnalo "La voz de Avilés" (98.10.07) la E-Grupo Antaŭen informis pri sia nova tute senpaga kurso okazonta en "Academia Escadem". La 24an de septembro, en la angulo "Leteroj al la Direktoro" de la sama ĵurnalo, aperis longa *Letero al ĉiuj amikoj de Esperanto*, subskribita de Antaŭen. Cetere en la urbo Avilés, esperantisto apartenanta al la loka E-Grupo ĵus inaŭguris libro-vendejon, en kiu jam eblas aĉeti la lernolibron "Esperanto, curso del idioma internacional".


# La Astura E-Asocio komencos novan kurson la 6an de novembro en Gijón, urbo kie ĉi-jare la asturaj samideanoj festos la tradician Zamenhof-tagon.

M. Luisa Menéndez

## Eŭskio

# La 14an de Oktobro komenciĝis nova elementa kurso. La instruado okazas du tagojn semajne, inter la 8a kaj 9a vespere. Nia nelacigebla prezidanto, Iñaki Velez, estas la instruisto.

# Okaze de la nova kurso, la vendredon, 9an de Oktobro, la loka televid-stacio "Canal Bizkaia" vizitis nian sidejon. Ili filmis



la ejon, la esperantajn simbolojn, kaj fine oni intervjuis 5 membrojn de la asocio. Tiu raporto enkondukis 1-horan programon dediĉitan nur al Esperanto kaj prezentitan en la televid-stacio mem. En ĝi partoprenis 4 gesamideanoj.

# La lundon, 12an de Oktobro, du anoj de nia Grupo estis intervjuataj pri Esperanto en radio-stacio "Radio Bilbao", ĉenero de "Cadena SER"; E-kantoj de "Ora Team" kaj klarigoj pri la historio kaj estonteco de Esperanto estis dissenditaj por la tuta Bilbao kaj ĉirkaŭaĵoj.

# Kristnaska loterio pretas jam en la E-Grupejo de Bilbao. Per ĉiu kvitanco oni ludos 250 ptojn, sed ĝia prezo estas 300 ptojn. La teksto estas tute esperantlingva.

# La sabaton, 12an de Decembro, ni festos la Zamenhofan tagon en nia sidejo. Ni komencos je la 7a kaj duono vespere. Al mallonga prelego sekvos viglan diskutrondon kaj ni finos per interesa interparolado ĉirkaŭ tablo plenplena de la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj.

J. Miguel García Iturrioz

## Kanariaj Insuloj


# La unua listo de lernantoj, kiuj deziras aliĝi al la Esperanto-kurso okazonta en la Universitato de la Laguna por akiri tri kreditojn por siaj studoj, estas jam plenplena (30 personoj). Fakte ekzistas eĉ dua listo

de "atendantoj" kiuj aspiras trovi lokon en la kurso. Nuntempe tiu dua listo konsistas el pli ol 35 personoj. Entute do volas aliĝi almenaŭ 65 personoj el kiuj finfine nur 30 rajtos fari la kurson.

Ankoraŭ estas tempo por aligho kaj, konsekvence, pluraj el la aliĝintoj povos forfali el la listo, sed oni povas diri jam ke la unua kurso (post la erao de s-ro Johano Regulo) estas grava sukceso por la e-movado en nia regiono.

Francisco Jose Davila



LOTERIA  NACIONAL

El portador está interesado con la cantidad de DOSCIENTAS CINCUENTA pesetas en el

**Núm. 07.457**

para el sorteo que se celebrará en Madrid, el día 22 de diciembre de 1998.

Nº 00215

Son 300 ptas.

Dentro de una Cédula o boleto. D. del m. 1. arrojado por rot.

Dóctores depositados en la Oficina n.º 4 de Caja Cantabria

## Kantabrio

# ACE (Asociación Cántabra de Esperanto) jam ofertas loterion al siaj membroj kaj simpatiantoj. Onidire, la numero per kiu la asocio ludas, estas premiota. Notu bone: 7457. Cetere ACE festos la librotagon, t. e. la Zamenhof-tago, per oferto de libroj kun rabatita prezo al sia membraro kaj poste la membroj ĝuos fratecan vespermanĝon.

M. Zocato

## Katalunio

# KAE invitas ĉiujn esperantistojn al la inaŭguro de la strato "Esperanto" en la urbo Sentmenat la 15an de novembro je la dekdua horo kun la ĉeesto de la Urbestraro.

Je la 11:30 oni renkontiĝos antaŭ la urbodomo, kaj post la inaŭguro oni festos

la okazaĵon per tagmanĝo en la restoracio "Can Rusiñol", apenaŭ 100 metrojn for de la nova strato Esperanto. Bv. kontakti s-ron Galofré por rezervoj antaŭ la 10a de novembro. Tel. 93-716-85-14.

# Organizita de KAE la 8an de novembro okazos en la Kultura Domo de Sant Cugat del Vallés unu plia "Babilado", kiu laŭkutime daŭros de la 11a ĝis la 13a horo. La kunvenontoj omaĝos samideanon Trinitat García Cobacho en ties 80a vivojaro. La temo de la debato estos "Ĉu la e-movado povus vivi sen la veteranoj?"

Post la debato, s-ino Trini regalaos nin per komuna tagmanĝo en "Bar Castilla". Malgraŭ, aŭ ĝuste pro, la "favora prezo" oni devas nepre antaŭanonci sian ĉeeston. Tel. 93-674-61-80 (s-ino Trini) kaj 93-727-50-21 (s-ro L. Serrano).

KAE

## Madrid

MEL Festos la Zamenhof-tagon per bankedo la 12an de decembro, sabate, je la 14:30 h. en Hotel Puerta de Toledo. Prezo: 2.700 ESP. Nepre rezervu antaŭe: 91-446-80-79. La kristnaska loterinumero estas 14.462. Ĉiu bileto kostas 200 pesetojn kaj inkluzivas donacon de 40 ptoj.

Lupe Sanz-Bueno

## Murcio

# La 10a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio kaj Murcio okazos en la "Casino de Lorca", Lorca (Murcio) (17/18 aprilo 1999). La temo: "Plibonigado de V.E.F. kaj Murcio". Jen la programo:

Sabato, 13 marto

09.00 Akcepto de kongresanoj kaj disdonado de dokumentoj ĉe la Kongresejo.

11.30 Kunvenoj de delegitoj.

13.00 Prelego: "La aktuala virsekseco", far s-ro José Pina Tuells.

17.00 Prelego: "Acerca de la no violencia". Juan Antonio Cabezas Martínez.

18.00 Solena Malfermo de la Kongreso

19.00 Kunsido de VEF kaj Murcia (unua parto): prezentado de la delegitoj, Estrar-raporto.

Dimanĉo, 14 marto

10.00 Oficiala foto.

10.30 Ronda tablo: "La aktuala virsekseco".

12.00 Ĝenerala Asembleo de VEF kaj Murcia (dua parto): demisio de la aktuala Estraro de VEF, elektado de nova Estraro.

14.00 Oficiala Bankedo.

Aliĝo al la Kongreso: 1.500 ptojn; Bankedo: 1.500; aparta eksterordinara dokumentaro: 500. Sendu la mendilon kaj kvitancon de la pago al: Juan Antonio Cabezas Martínez, Avda. de la Flota, 7, 3° B. 30008 Murcia, kaj sendu la monon al Federación Valenciana de Esperanto, Caja Postal, Plaza de España de Valencia, kontonumero 00-0.017.830.370.

Informoj pri loĝado: Hotel Alameda: (apud la Kongresejo) C/ Muso Valiente, 8. Telefono 968 40 66 00. Dulita ĉambro: 7.000 pesetoj - 10% rabato + IVA; Unulita ĉambro: 3.500 pesetoj - 10% rabato + IVA. Hostal del Carmen: (malmultaj ĉambroj) C/ Rincon de los Valientes. Telefono 968 46 64 59. Dulita ĉambro: 4.000 pesetoj + IVA; unulita ĉambro: 2.000 pesetoj + IVA. Residencia Alberca: C/ Juan Moreno. Telefono 968 40 65 16. Dulita ĉambro: 3.000 pesetoj + IVA. Unulita ĉambro: 1.700 pesetoj + IVA. MENDU MEM!

Augusto Casquero

## Valencio

# Komenciĝas diversaj kursoj de Esperanto. Unu el ili en la lernejo por plenkreskuloj "Reina Doña Germana", kiu dependas de la Generalitat Valenciana. Fine de la kurso la gelemantoj ricevos oficialan atestilon. Dua okazos en Grupo Esperanto de Valencia mem, kiel kutime.

Estas oficialaj petoj por okazigi du E-kursojn. la unua en la Fakultato pri Filologio de la Valencia Universitato, kun propono validigi ĝin per 3 kreditoj (anstataŭ 2 en la antaŭa lernojaro), kaj la alia en la C.E.P. (nun nomata CEFIRE), Centro de Profesoroj, por okazigi kurson de E-o por lernejoj profesoroj.

# Ĉi-jare Grupo Esperanto de Valencia celebros la Zamenhofan Tagon la 19an de decembro, pere de ofero de laŭro-krono ĉe la memortabulo de la Strato Zamenhof; prelego en la sidejo de la asocio, kaj oficiala bankedo ĉe la Restoracio "La Estrella".

# La numero de kristnaska loterio de GEV estas: 13.235. La ludantoj partoprenas per 160 pesetoj en ĉiu kvitanco, por kiu ĝi pagas 200.

Augusto Casquero

## Donacoj AL H.E.F.

12-04-97 Miguel Gutiérrez . . . . .	8.000
01-10-97 (sennoma donaco) . . . . .	25.000
17-02-98 Martín Aguado . . . . .	1.000
09-01-98 Tomás Apraiz . . . . .	300
05-03-98 Tomás Ortiz . . . . .	300
16-01-98 José Sardá . . . . .	1.800
14-03-98 Carme Llapart . . . . .	1.300
12-01-98 Víctor G. Henríquez . . . . .	6.600

De la 3a ĝis la 10a de Oktobro okazis en Calafell la 6a Internacia E-Semajno kun kontentiga partopreno, preskaŭ cent homoj, pli ol dudeko da ili eksterlandaj.

Estis du specialaj invititoj. La unua, prof-ino Carla de Lorenzi (Italio), ĉiutage gvidis, kiel en antaŭaj jaroj, rektmetodan E-kurson. En sia instrua tsko, ŝi sindone klopodis tiri profiton eĉ el ĉiu aparta minuto laŭlonge de la tuta semajno. La dua invitito estis d-ro Arpád Mathé (Hungario), docento pri esperantologio kaj kemia teknologio kaj ekologio, instruanta en tri fakultatoj de Vezprém kaj Budapeŝto. Li faris du majstrajn preleĝojn vere studindajn.

La loĝejo estis centra hotelo de Calafell. La kunvenoj kaj preleĝoj okazis ĉe la aŭditorio de la urbodomo. En la unua tago oni akceptis la alvenintojn kiuj profitis por plaĉe promeni ĉe la bela plaĝo. En la dua tago, la Prezidanto de IESKT, Lluís M<sup>a</sup> Hernández Izal malfermis la *Semajnon*, kaj nome de la urbo, la vicurbestro de Calafell esprimis sian bonvenon per afabla parolado. Poste parolis la eksterlandaj reprezentantoj.

Posttagmeze prelegis prof. Mathé pri *Historio kaj bibliografio de la esperanto-periodaĵoj*. Li menciis

longan liston de periodaĵoj ekde la naskiĝo de la movado. Kaj pli interese, li faris sukajn komentojn pri la plej gravaj. Ne vane li havas sur slipoj informojn pri ne malpli ol 11.000 diversaj periodaĵoj (96 elcento en Esperanto). La preleĝon sekvis vigla kolokvo.

Post la vespermanĝo, je la 22:00 h. venis debato gvidata de s-ano Luis Serrano pri la temo *Kiel vi fartas, s-ro Eŭro?* Nu, longaj, longegaj intervenoj kun plej diversaj opinioj, tamen... neniu pri financoj!

En la mateno de la tria tago, lundo, prelegis s-ano Marti Gerrero, helpante sin per video-bildoj, pri la temo *Gaudi kaj lia verko*. Tre interesa kaj dokumentita preleĝo, de arta vidpunkto.

En la posttagmezo prelegis Antonio Marco Botella pri la temo *Historio kaj kulturo en la mezepoko*. Li faris kronologian prezenton pri



6a

historiaj eventoj de Al-Andalus (Iberio), pri la naskiĝo kaj florado de altnivela kulturo kaj pri kiel tiuj civilizaciaj konkeroj evoluis kaj fine transiris al eŭropaj universitatoj kaj aliaj kulturaj medioj sub formo de manuskriptoj, tradukaĵoj kaj lernolibroj. Je la fino estis longa kolokvo.

Je la 22:00 h. okazis debato sub la gvido de s-ro Luis Serrano pri la temo *Ĉu estas homa naskiĝokrizo?* Kiel kutime en tiuj debatoj, esprimiĝis plej diversaj opinioj ĉi-foje ĝis... noktomezo!

Kvazaŭ por doni ripozon al la partoprenantaro, la mardon okazis duontaga ekskurso kun vizitoj al la kastelo de Calafell kaj al la Ibera Vilaĝo. Posttagmeze s-ano Giordano Moyá prelegis pri la temo *Planediĝo kaj homarunuiĝo*, kun racia ekspliko pri la nebremsebla evoluo de la homaro al unuiĝo, malgraŭ kelkaj regresemaj naciismoj kaj manko de idealismo. S-ro Moyá emfazis la esperantistan idealon kaj ĝian influon por atingo de tiu futura socio. La sekva kolokvo nur akcentis la perspektivon de tiu vojo jam perceptata de la aŭtentaj esperantistoj, escepte de fanatikuloj.

La merkredon oni ĝuis tuttagan ekskurson al Monaĥejo Monserrat kun survoja vizito al ĉampan-keleto *Romagosatorné*.

En la ĵaŭdo estis duontaga ekskurso al parko *Sama kaj Roko Sant Cayetá*. Vere logaj kaj vizitindaj lokoj. Je la 22:00 prezentigis havan-kanzonoj. Belaj kantoj plenaj de nostalgio kaj mildaj melodioj.

En la vendreda mateno prelegis prof. Mathé pri la temo *Aplikado de Esperanto en la sciencoj kaj fakoj*. Nova elmontro de la talento de la preleganto, kiu klarigis kiel apliki Esperanton en la sciencoj farante

## Esperanto universitate

13

La 15an de julio ĉe la Beletra Fakultato de la Universitato de Torino (fako scienco de la komunikado) Federico Gobbo, 24-jara, tre brile diplomigis per disertacio pri "La dilemo de Esperanto inter helpfunkcio kaj civitanigo".

La pli ol 400 paĝa disertacio estis longe diskutita antaŭ la juĝanta profesoro kiu juĝis al Gobbo la plej altajn eblajn poentojn, ege malofte donataj en la italaj universitatoj, nome 110/110 kun laŭdo, honora mencio kaj deklaro de indo je publikigo.

La disertacio, jam nun konsiderebla klasikaĵo inter la priesperantaj esploroj, konsistas el tri partoj: Esperanto komunikata, Esperanto komunikanta, Esperanto komunikebla.

GCF

Ĝin utila al ĉiu homo de ajna kontinento. Nu, pragmataj aplikoj jam funkciantaj kvankam ankoraŭ ne tro vaste.

Je la 22:00 h. oni debatis pri tio *Ĉu la Semajno bone funkcias?* kun ĝenerale pozitiva opinio de la partoprenantoj.

En la sabaton okazis la fermo de la Internacia Semajno. La instruistino Carla de Lorenzi disdonis diplomojn al sia lernantaro. Poste adiaŭaj paroladoj kaj sopiroj al la venontaj *Semajno*.

Nu, miaopinie la aranĝo estis tre bone organizita, ĉar oni saĝe miksis laboron kun distro. Nur unu bedaŭro... la manko de gejunuloj.

A.M.B



# Ĉirkaŭ la mondo

## Kialo por lerni Esperanton

En Kievo estas lanĉita nova medicina revuo "36,6" kaj en la unua numero estas tutaĵa artikolo de Sergeo Vargatij "Lingvo de Jumeiĥo estas Esperanto". En ĝi estas eta skizo kio estas Esperanto, pri Universala Medicina Esperanto-Asocio, pri Masajuki Sajonĵi kaj Instituto de Preventa Medicina Praktiko en Tokio kaj eblecoj de Jumeiĥo-terapio.

Estas interese, ke aŭtoro de la artikolo mem ellernis Esperanton nur pro tio, ke ekzamenon pri rajto uzi Jumeiĥon eblas fari nur en la japana aŭ en Esperanto kaj por la 3a kaj 4a gradoj — nur en Esperanto.

Mikaelo Lineckij

## 24a Internacia Forumo

Dum 26-30 septembro 1998 okazis en Bydgoszcz (Pollando) la 24a Internacia Forumo pri Turismo kaj Kulturo de "Monda Turismo" kaj seminario "Esperanto-2000" pri edukado, kulturo kaj turismo.

Partoprenis reprezentantoj de 13 landoj: Albanio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥio, Germanio, Hungario, Kanado, Latvio, Litovio, Pollando, Rumanio, Ruslando kaj Slovakio. Dum la seminarioj debatoj oni pridiskutis i.a. studadprogramojn por kvinjara magistriga studado pri turismiko, kaj ankaŭ

pri kulturĝeografio, eŭrologio kaj lingvoinstruado.

En la studumo de "MT" en Bydgoszcz studas turismikon ĉiutage preskaŭ 80 personoj, kaj eksterĉeeste ĉirkaŭ 30 — sume iom pli ol 100. Krom tio fondiĝis konsultejo en Karlovo (Bulgario) por 35 gestudantoj kaj fondiĝas konsultejo en Panevezys (Litovio) por pliaj 20 personoj.

Mara Timermane (Latvio)

## Interna afero — ekstera informado

Antaŭ la Montpeliera UK la individuaj membroj de UEA elektis siajn reprezentantojn en la Komitato de UEA, la t.n. komitatojn B. Unuavide tio ŝajnas pure interna afero, kiu ne interesas ekstermovadan publikon. Usona esperantisto Arland R. Meade el Bartow, Florido, tamen lerte kaptis en ĝi okazon por doni konkretan ekzemplon pri efektiva internacieco per Esperanto. Li sendis jenan artikoleon al sia loka gazeto, "The Polk County

Democrat", kiu aperigis ĝin la 29an de junio:

*"Esperanto parolata ĉe ni*

Legantoj de The Polk County Democrat certe havas diversajn spertojn pri internacia aktivado. Ĉu iu el ili tamen similas kun tio ĉi:

Mi ĵus sendis balotilon al Nederlando voĉdonante por 8 el 16 kandidatoj por funkcio en internacia organizaĵo. Mian voĉon ricevis kandidatoj el Koreio, Bharato, Kostariko, Ĉinio, Hispanio, Ruslando, Israelo kaj Japanio.

Mi scipovas la gepatran lingvon de neniu el tiuj kandidatoj, kaj ili eble ankaŭ ne scias la mian. Mi tamen povis fari mian decidon leginte iliajn biografietojn kaj or-

ganizajn celojn. Ĉio tio estis en la internacia lingvo Esperanto.

Se iu leganto deziras scii pli pri ĝi, mi volonte respondos al leteroj. [Sekvas la adreso.] Ankaŭ en la biblioteko de Bartow oni povas trovi librojn pri Esperanto.

Arland R. Meade”

La elekto de la Komitato de UEA neniel tuŝas la vivon en la regiono de la gazeto. Kial do la redakcio akceptis tiun tekston? Ĝi trovis la tekston interesa, ĉar ĝi prezentas nekutiman personan sperton de leganto.

Kalle Kniivila", estrarano de UEA pri informado, skribas en la oktobra numero de "Esperanto" pri la graveco de personaj spertoj en la informado pri Esperanto. S-ro Meade donis imitindan ekzemplon pri tio.

GK de UEA



## Heroldo

Gian Carlo Fighiera, prezidanto de la leĝe registrita societo sen profita celo "Heroldo de Esperanto" dissendis informon kun la titolo "Heroldo reiros al sia legitima posedanto". Jen ĝi:

1. Nia neprofitcela societo "Heroldo de Esperanto", ricevis la samnoman gazeton de la fondinto Teo Jung en 1960 kaj daŭrigis ĝian eldonadon ĝis 1996 sub la 36-jara redaktado de Ada Fighiera-Sikorska.

1. En 1996 nia asocio transdonis la gazeton al la Itala Interlingvistika Centro (Milano) sub la nepra kondiĉo -trifoje ri-

petita en la protokolo de la 17a de julio 1996, subskribita ankaŭ de Ada en drama viv-cirkonstanco, - pri "respekto de la tradicio kaj principoj" de la gazeto. La tradicio kaj principoj estis, i.a. el: la gazeto havas Ĉefe informan karakteron pri la disvastigo de Esperanto; ĝi estas sendependa kaj supertendeca pri movadaj ideologioj kaj internaj konfliktoj.

2. Kiel Ĉiuj povas konstati, la supraj kondiĉoj neniam estis respektataj de la nova redakcio. Jam fine de 1966 en la "raŭmista" gazeto "Literatura Foiro" (LF) oni povis legi, ke post la akiro de "Heroldo" la raŭmistoj (malgranda tendenca grupo, preskaŭ nur eŭropa, kiu opozicias al la ĝenerala Esperanto-Movado, negative juĝas la Universalajn Kongresojn kaj proponas alternativan Esperanto-komunumon) posedas du gazetojn: la diritan LF kaj Heroldon mem. Konforme al la supre citita deklaro, la novaj redakcianoj, kunaŭtoroj de la rezolucio de Raŭmo (Finnlando) en 1980, senrajte transformis la gazeton en personan organon de ramisma ideologia propagando kaj de siaj privataj kvereloj; en ĉiu numero la redakciaj geedzoj daŭre kaj grandspace aperigadas tendencajn artikolojn sub propra nomo, sub aliaj kromnomoj aŭ prunteprenitaj aŭ elpensitaj subskriboj

(Valerio Ari, Giorgio Silfer, Nicolas Vanof kaj aliaj estas la sama persono; ankaŭ pluraj surpaperaj E-societoj estas ligitaj al tiu persono).

La lukto de la nuna redakcio kontraŭ nia Movado, kontraŭ personaj kontraŭuloj kaj kontraŭ aliaj Esperanto-gazetoj eskaladis ĝis senprecedence granda nombro da artikoloj kun ripetitaj en Ĉiu numero klaĉoj, pikoj, subfosoj, rezolucioj, mani-



festoj, polemikoj, atakoj, provokoj kaj personaj skandaloj; sen paroli pri la utiligo de la gazeto fare de la redaktorino por propagandi sian propran kandidatigon Ĉe Akademiasj elektaj.

Ĉio tio semas malharmonion inter la esperantistoj kaj montras, ke "Heroldo" estas nun redaktata ekzakte laŭ la malaj principoj ol tiuj, kiuj inspiris Teo Jung kaj Ada, ambaŭ amataj, pacemaj, lojalaj agantoj en nia Movado dum entute pli ol 70 jaroj. Evidente, la raŭmismoj rajtas diskonigi siajn teoriojn, sed ne rajtas eluzi tiucele Heroldon.

3. Dum la pasintaj du jaroj nia societo vane provis per dekoj da privataj kaj publikaj atentigoj konvinki la novan redakcion de la gazeto respekti la fundamentan kondiĈon ligitan al la transdono de la gazeto, t.e. la respekto de ĝiaj tradicio kaj principoj.

4. Ĉar la supre citita kondiĈo de la transdono estis kaj estas malrespektata de la novaj eldonantoj, la transdono mem fariĝis senvalora kaj aŭtomate nuligis. Tial, nia Societo decidis repreni Ĉiujn siajn antaŭajn rajtojn ek de 31-a de decembro 1999, dato je kiu -laŭ sciigo en la kolofono de la nuna "Heroldo"- finiĝos la deĵoro de la nuna redaktorino.

Ek de nun, la eldon-kaj vendorajtoj de la nacilingvaj lernolibroj eldonitaj de nia societo iras senpage al landaj asocioj de la koncernaj lingvoj.

5. Fine, per la nuna komuniko la subskribinto nuligas sian alvokon (lasta numero de "Heroldo" de 1996), en kiu li petis abonantojn de "Heroldo" resti fidelaj al la nova redakcio. La esperantistoj laboru por la disvastigo de Esperanto, for de ideolo-

gioj, kiuj senhalte semas malkonkordon per la mono de la abonantoj de "Heroldo".

6. Nia societo sendos al Ĉiu petanto kopion de la supre menciita protokolo de 1996 pri la transdono de "Heroldo" kaj la koncernan postan korespondadon.

Torino, la 1an de oktobro 1998

## Astrologio

Fondiĝos organizaĵo kun nomo Astrologa Esperantista Societo. Tial mi serĉas kontaktojn kun tiuj kiuj okupiĝas pri astrologio, aŭ interesiĝas pri la temo kaj tial volonte partoprenus en la laboro de nova societo. Inf: d-ro Robert Nagy, hungara profesoro pri astrologio; Retpoŝte: AstroEsp@dpg.hu

## Berlina IKU-sesio

Kadre de la 84a UK en Berlino okazos la 52a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. Ĝia rektoro estos prof. Reinhard Selten, laŭreato de la Nobel-premio por ekonomiko.

En IKU rajtas prelegi universitataj profesoroj aŭ aliaj simile kvalifikitaj fakuloj. Prelegproponojn oni sendu al la la sekretario de la UEA-komisiono pri IKU, prof. d-ro H.M. Maitzen; Endemanngasse 6-18/1/24; AT-1230 Wien; Auhstrio (retadreso: maitzen@avia1.una.ac.at). La propono enhavu koncizan prelegresumon (maks. 200 vortoj) kaj biografieton kun persona bibliografio. La prelego laŭeble (ne devige) rilatu al la kongresa temo, "Tutmondigo: ŝancoj por paco?". Limdato por kandidatigi estas la 15a de januaro 1999.

La elektitaj prelegantoj ricevos honorarion sed ne repagon de siaj kostoj. Ĉiu

preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Aparte bonvenaj estas junaj kandidatoj kaj scienculoj, kiuj antaŭe ne prelegis en IKU.

## Esperanto por sociala integriĝo

Sub la nomo “Sociala Integriĝo kaj Esperanto” (franglingve: “Réinsertion et Espéranto”) fondiĝis asocio en Montpeliero, Francio, en septembro 1997. Ĝi celas klopodi por sociala integriĝo de senlaburoloj, ricevantoj de Minimuma Integriĝo Enspezo, kaj gejunuloj en ekstrema situacio, per instruado de la Internacia Lingvo.

Ekde la komenco de la jaro 1998, la projekto komenciĝis kun du lernantinoj, unu 29-jara kaj alia 26-jara. Ili ambaŭ lernas senpage la lingvon po 5 horojn semajne kaj tiel akiras intelektan scion. La Interna Ideo de la lingvo ebligas al ili alian rigardon al la nuna mondo, sed ankaŭ danke al tiu lernado, ili povos esti dungitaj de la asocio se ili trafos du celojn:

- 1) atingi la kapablecan nivelon
- 2) proponi al la estraro de la asocio personan kaj profesionan projekton faritan de si mem por labori kadre de la asocio por -kaj per- Esperanto, cele al gejunuloj aparte.

Estonte, la asocio bezonos: unue instruistojn, due retanojn, kaj trie vojaĝistojn ktp. sed, ekde nun, la helpon de ĉiuj tra la mondo, kiuj povos, ĉu doni ideojn, ĉu proponi diversajn kunlaborojn, ĉu, evidente, monsubtenon. Fakte, la projekto des pli valoriĝos, ju pli la esperantistaro montros intereson pri ĝi.

Koncerne la financadon, la asocio submetas sian projekton al la konsidero de

regionaj publikaj instancoj sed ankaŭ de la registaraj kaj de eŭropaj. Tamen, la asocia statuto ebligas ankaŭ al privatuloj, speciale al esperantistaro alporti sian monhelpon. Jam kelkaj en Francio subtenas ĝin.

La nuna estraro de la asocio konsistas el: Thierry Saladin (kuracisto) prezidanto; Patrice Brandy (kuracisto) kasisto; Josie Estopina (senprofesia) sekretariino. Utilaj informoj haveblas ĉe: Association Réinsertion et espéranto; Résidence Vigne de la Vierge, Bat. 6; 147, Avenue Paul Bringuier; FR-34080 Montpellier; Telefonnumero: 33 ((0) 467-75-62-98; Fakso: 33 (0) 466-32-44-03.

## Fiziko

Ĝus aperis TTT-ejo pri fiziko. La loko nomiĝas: Internacia Fiziko, kaj situas en: <http://fiziko.org>

En ĝi troviĝas ligojn al informoj pri fiziko ekzistantaj en aliaj lokoj, sed oni povas ankaŭ kontribui per artikoloj kaj informoj pri la temo, kiuj gastos en la servilo de “Internacia fiziko”. Ni invitas vin kontribui!

Jam estas ligoj al artikoloj pri astrofiziko, astronomio, fizikistoj (personoj), kvantummekaniko, partikloj, pri sciencaj fakoj ĝenerale, nanoteknologio, matematiko, meteologio, elektro, librilisto, terminaroj, glosaroj ktp.

## Beethoven kaj Esperanto

Se vi vizitas Vienon, bonvolu veiu en la Beethoven-loĝejon, kie rehaveblas lia testamento en bona esperanta traduko! Adreso: Vieno, 19a distrikto, Probusgasse

6; Buso 38 A, haltejo Armbrustergasse.  
Telefono: Vieno 318 82 15.

Walter Klag

## Esperanto por uzbeklingvanoj

Finfine aperis “Esperanto halkaro tili” (“Internacia Lingvo Esperanto”) la unua uzbeklingva E-studlibro. Pri ties apero raportis lokaj kaj tutlandaj amaskomunikiloj. La 230-paĝan libron aŭtoris samarkandaj esperantistoj Anatoli Ionesov (direktoro de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro) kaj Bahodir Habibov (profesia lingvoinstruisto). La libro enhavas 12-lectionan E-gramatikon, Esperanto-Uzbekan kaj Uzbeka-Esperantan vortaretojn kaj Uzbeka-Esperantan konversacilibreton. Krom tio enestas kurta esperantlingva priskribo de la uzbeka lingvo, ties gramatiko kaj prononcreguloj, kio faras la libron interesa kaj praktike uzebla ankaŭ por alilandaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la uzbeka lingvo kaj al vojaĝantoj al Uzbekistano. La libro aperis ĉe moskva E-eldonejo “Impeto” danke al financa subteno de la Eduka Fondaĵo Carson. La eldono estas dediĉita al la Internacia Muzeo de paco kaj Solidaro, kies naskiĝo okazis en Samarkando antaŭ ĉio danke al la internacia lingvo Esperanto.

A. Ionesov

## Esperanto en la kosmo

La brazila revuo VEJA (Rigardu), numero 1510 (9a de septembro 1998), paĝo 83, enhavas artikolon, kies titolo estas: Espaço: Mensagem para o futuro (Spaco: Mesaĝo por la futuro). Inter aliaj aferoj la teksto diras:

«En 2001 la entrepreno “Aerospatiale” lanĉos spacveturilon, kiu restos 50 mil jarojn ĉirkaŭ la tero. Ĝi portos 8 kompaktdiskojn kun mesaĝoj de la homoj. Ĝi nomiĝas “Keo” kaj ĝi havas la hejmpaĝon: <http://www.keo.org> La dezirantoj povas lasi siajn mesaĝojn en ajna lingvo.»

Kial do ne en Esperanto?

Aristóphio Alves Filho

## Romia kulturo

La ĉi-jara temo de la Internacia E-Konferenco, “Romiaj influoj kaj la latina lingvo en la mondkulturo”, estis multflanke traktita: historiografie fare de Maria Butan, Jan Goldriĉ kaj Bardyl Selimi, religie kaj filozofie fare de Eugene de Zilah kaj Vinko Oúlak, lingve fare de Günther Becker, beletrio fare de Vera Barandovská-Frank kaj Bruno Masala.

Jen koncepta spurado en antikvaj verkoj, jen rememorigo pri antikvaj granduloj komunaj al ĉiuj okcidentanoj, jen prezentado de nuntempaj latinlingvaj beletristoj, aŭ de modernaj pensuloj klasikece inspiritaj... Ĉiuj prelegoj ŝajnis pruvo ke esperanto estas denaske romikultura lingvo.

La programo estis tre riĉa kaj rapide alvenis vendredo, tago de la ĝenerala asembleo de OSIEK. La Societo fariĝis dekjara ĉi-somere, kaj atribuis sian premion la naŭan fojon. Ĉi-jare, per tri balotoj, ĝi estis voĉdonita al Claude Piron, pro La Bona Lingvo.

La venonta IEK okazos en Metz, Francio, 17—23 jul. 1999.

Ĉeftemo: Mono kaj Civilizo. Aliĝu ĉe Eric Laubaĉer (1 rue des Vosges, F-78180 Montigny le Bretonneau, Francio).

Bruno Masala

## Nova estraro

Laŭ informo de d-ro Werner Bormann, el la 43 akademianoj, voĉdonis 37 (plus unu neakceptita voĉdonilo, kiu alvenis malfrue). Jen la rezulto de la voĉdonado:

Prezidanto: Geraldo Mattos (Brazilo) 27; Perla Ari-Martinelli (Italio) 10.

Vicprezidanto: Christer Kiselman (Svedio) 25; Michel Duc Goninaz (Francio) 21; Amri Wandel (Israelo) 8; Donald Broadribb (Aŭstralio) 7; Carmel Mallia (Malto) 3.

Sekretario: Renato Corsetti (Italio) 34.

Neniu el la kvar novelektitaj estraranoj (Mattos, Kiselman, Duc Goninaz, Corsetti) membris en la antaŭa estraro. La nova prezidanto de la Akademio de Esperanto fariĝis brazilano Geraldo Mattos — tiel do la Akademio, same kiel UEA, eniros en la 3an

jarmilon kun sud-hemisfera prezidanto.

Geraldo Mattos naskiĝis en Rio de Janeiro 29an de junio 1931, filo de portugalingo kaj brazilano. Li eklernis Esperanton en 1947 post la trovo de germana libreto en la biblioteko de la Franciskana Seminario, kie li tiam studis en la duagrada kurso. Bakalaŭro (1957) kaj licenciulo (1958) en la Pontifika Katolika Universitato de Paranao, kaj doktoro pri la Portugala Lingvo (1965) en la Federacia Universitato de Paranao. Membro de la Akademio de Esperanto ekde 1970. Redaktoro de *Monato* pri noveloj kaj poezio ekde 1998. Aŭtoro de pluraj libroj en la portugala kaj Esperanto. Laŭreato de la Dekaj Paranaaj Premioj pri Scienco kaj Teknologio, jaro 1995, transdonita en 1996, en la fako pri Homaj kaj Sociaj Sciencoj.

---

[www.esperanto-es.org](http://www.esperanto-es.org)



## Lorca: poezia fenomeno el hispana or-epoko

*(Omaĝe al Federico García Lorca en  
la centa datreveno de lia naskiĝo)*

Jaroj 1898 kaj 1936, jaroj brul-stampitaj de tragedio, jaroj koŝmarecaj en la kolektiva memoro de Hispanio —du militoj: kiom da senutilaj sango-flakoj, kiom da sismoj korpaj kaj animaj!—, jaroj signantaj, krome, respektive, la naskiĝon kaj la morton —murdigon— de la plej universala el la hispanaj poetoj: Federico García Lorca<sup>1</sup>.

Ne, mi ne kredas je la pitagorisma esenceco de la nombroj, je superstiĉaj fatalismoj. Hazardo forte priresponzas eĉ la plej intimajn procezojn en la naturo. La scienco tion konfirmas. Hazardo, tamen,

# Hispana literaturo



ne malofte akordigas tiom da disaj elementoj —kaprice, blinde—, ke ĝiaj rezultoj ŝajnas respondi al la leĝo pri kaŭzo/efiko.

Tielas ĉi-kaze. Apenaŭ plonĝinte en la Lorca-an biografion, oni tuj ricevas nigrajn trablovojn. Enmondiĝo en 1898! Ĝuste la 5-an de junio de la “katastrofa jaro”! En la andaluza vilaĝeto Fuente Vaqueros (Granado). La unuaj ploroj de la bebo Federico eble koincidis kun stertoroj de mortantaj soldatoj. Milito en Kubo. Frenezaĵo, al kiu la regantaj klasoj trenis la metropolajn hispanojn —ne ĉiajn (bonhavaj “patriotoj” povis aĉeti sian nepartoprenon: tiele oni skribas la Historion!)— kontraŭ la justaj depostuloj pri sendependeco far transmaraj fratoj. “Milito, kia fraŭdo!” Pocente, pomile homoj cisaj falas; homoj transaj, plie, suferas hororojn en la koncentrejoj starigitaj de la hispana generalo Weyler. Simila insurekcio ekflamas en Filipinoj. Kaj Usono, “sindona” gardanto de rajtoj aliesaj, deklaras la militon kontraŭ Hispanio. Goljato kontraŭ iu Davido kun brakoj el koto.

Enmondiĝo en 1898! Sed alvenas la paco. Nepre. En decembro Hispanio kaj Usono —ĉu ne sarkasme (jen la prezo de la usona “sindonemo”), ke ĝuste Kubon oni tenas eksterlude?— subskribas la Traktaton ĉe Parizo. Ĉi dokumento proklamas la “sendependecon” de Kubo, kiu, fakte,

restas sub usona kontrolo; Filipinoj kaj Porto-Riko fariĝas kolonioj de Usono. Jen la krepusko, la lastaj disŝiriĝoj, la fino de imperio ali-epoke tiel vasta, ke iam “ĝi ne konis sun-subirojn”. Sed disfalis, precipe, tuta ideologio —burĝa, dekadenca kaj absurda—, kiu nutris sin nur el la paseo.

Imperiismo, tamen, kiel ĵus vidite, ne forŝrumpis. Ĝiaj novaj formoj stuporigis la mondon. La ĵurnalo *New York Journal* jene taksis la rezulton de la milito:

Hispanio havis la plezuron dissaltigi la Maine-krozoŝipon kaj mortigi 266 usonajn mar-armeanojn. Jen la kosto de tia plezuro:

Kubo .....	\$ 1 500 000 000
Filipinoj .....	\$ 2 250 000 000
Porto-Riko .....	\$ 750 000 000
Milit-elspezoj .....	\$ 625 000 000
Komercaj perdoj .....	\$ 100 000 000
Perdo de tridek ŝipoj .....	\$ 150 000 000
Entute .....	\$ 5 375 000 000

Ĉirkaŭ 5.500 mortintoj kaj vunditoj

Jen la kosto por Usono:

1837 mortintoj kaj vunditoj \$ 1 112 500 000

Nu, la aliaj potencoj havantaj koloniajn imperiojn kaj la deziron ilin konservi prenu bonan noton<sup>2</sup>.

Deprimo, angoro pro spirito-perdo, pasia serĉado de la propra identeco kiel popolo —kio estas, kien iras Hispanio?—. Tian sedimenton lasas la katastrofo ĉe la intelektularo tiutempa. Temas pri la nomata *Generacio de '98*, multnombra plejado de verkistoj —i.a. Unamuno, Baroja, Azorín—, kiuj elspuris la kvintesencon de l' o hispana, instruis nin rigardi per nova sen-

tivo la pejzaĝon —la animon— de Kastilio, la mirindan frenezon de Donkiĥoto, la humanan dimension de Cido... Hispanio kiel problemo, kaj la literaturo kiel analizo kaj serĉilo de solvoj.

Sed, paralele, alitipa —nur estetika— ondo da nekonformismo kaj disidenteco, kun intensa akcento antiburĝa, leviĝas en la tuta Hispanlingvio —ĉefe en la amerika flanko— kontraŭ la tiama poezio prozeca, bombasta kaj vakua. Jen ni staras antaŭ la *Modernismo*, ia sintezo de la francaj skoloj parnasa kaj simbolisma, kiu markos la hispanlingvan beletron ĝis la alveno de la ĉi-jarcentaj avangardoj. La modernistoj zorgas antaŭ ĉio pri la arto. Indiferentaj al socio, kiun ili taksas materialisma kaj griza, ili alstrebas la belon, ĉion raran, ekzotan, rafinitan, paganan, legendan, kosmopolitan... Kaj signas sian kontestadon per bohemiaj vivo-formoj, kvazaŭ turnante la dorson kun defia pozo kontraŭ disdegnata realo.

La modernistaj poemoj, eksteraj al la gravaj sociaj problemoj komencjarcentaj, ĝenerale plenas de dioj, nimfoj, centaŭroj kaj satirusoj; de grafoj kaj princoj; de Pieroto'j kaj Kolombina'j; de pagodoj kaj versajleskaj salonoj; de parfumitaj ĝardenoj kun cignoj kaj libeloj, elefantoj kaj kameloj; de palacoj, kie brilas eburo, perloj, gemoj... Percepteblas ankaŭ faceto intimisma, la preferata de la hispanaj modernistoj, kun du registroj: unu vitalisma

Ĉi tiu artikolo aperas  
samtempe sur la paĝoj  
de Boletín kaj de la organo  
de Esperanta PEN-Centro,  
Literatura Foiro.

kaj sensuala<sup>3</sup>; alia melankoliema, karakterizita de la gusto al l' o aŭtuna, krepuska, dekadenca. Sed, spite al —kaj transe de— ĉi abundo da sugestaj celaj ornamoj, tiaj antiburĝaj etburĝoj spirite aristokratecaj, elegantaj, eskvizitaj —foje ĝis ridinde— radike renovigos la hispanan poezian lingvaĵon: esploros la koloron kaj la muzikon de la vortoj por krei aliteraciojn, ritmojn surbaze de trieraj piedoj —fremdaj al la silabnombra hispana metriko—, nesuspektitajn strofojn, neologismojn —jes, neo-lo-gis-mojn!— kaj virtuoze entreprenos la ekspluatadon de ĉiaj sinestezi<sup>4</sup>, tropoj, simboloj...

Modernisme ĉefpontifikis kaj pintis la nikaragvano Rubén Darío. Multaj el la grandaj hispanaj poetoj ĉi-jarcentaj —i.a. Antonio Machado, Valle-Inclán kaj la nobelpremiito Juan Ramón Jiménez— komence trinkis el liaj fontoj, kvankam ili baldaŭ ekvelis antipoden, elpurigen, kaj trovis proprajn voĉojn. Majstrajn. Kiom da lirikaj esenco kaj profundo!


La influo de Darío, mortinta en 1916, parte atingas ĝis la unuaj poemoj de Lorca —*Poemlibro* (verkita de 1918 ĝis 1920)— kaj ties unuaj dramoj —*Mariana Pineda* (ekverkita en 1923)—.

*Generacio de '98* kaj *Modernismo* —en-

gaĝiĝo fronte al arto por la arto, transcendo fronte al formalo, esprima sobro fronte al vorta lukso— konstituas diferencajn elementojn de apertiĝo al la ekstera mondo. La unua movado, kiel dirite, traserĉis la hispanan animon. Ĝia komenca enmemiĝo

baldaŭ evoluis ebligante la enflon de ali-landaj trablovoĵoj. La ideo, ke nur eŭropanigitaj hispanoj povas malkovri Hispanion, ke ĉi miskonatan landon de Carmen'ajj toreistoj kaj tamburino oni esploru per univ-ersalaj instrumentoj, ricevis institucian apogon. La Konsilio por Stud-Etendo, sub la prezidanteco de la nobelpremiito Ramón y Cajal, "la Donkiĥoto de la mikroskopo", realigis de 1907 ĝis 1936 mirindan sinkronigon de la hispana universitata agado kun la transpirenea. Centoj da junaj talentuloj plivastigis siajn studojn eksterlande, ĉefe en Germanio —inter ili la filozofo-verkisto Ortega y Gasset, la matematikisto Rey Pastor kaj la socialisma juristo Fernando de los Ríos, mentoro de García Lorca—. Kun la apogo de la Konsilio kreiĝis en 1910 la Centro de Historiaj Studoj, kiu, sub la gvido de Ramón Menéndez Pidal, esploris la hispanajn literaturon kaj arton per universala metodologio. Ĝia mergiĝo en la Romancaron kaj tradician lirikon donis sukajn fruktojn.

Mezepokaj kastiliaj tekstoj eldonitaj de la Centro rolis ĉe Lorca kaj ties grupo inspir-fonte. Tiel, ke la hispanaj beletraj avangardoj, en plena sinkroneco kun la eŭropaj ismoj —kubismo, futurismo, dadaismo, surrealis-



mo... — tamen ne ikonoklastis kontraŭ la tradicio, sed alvenis al unika sintezo, kie pleja novo harmonie kunekzistis kun antikvaj formoj.

Jen do kiel, paradokse, la katastrofo en 1898 anstataŭ marki la malaperon de His-

panujo el la universala historio, laŭ antaŭvido far la usona gazetaro, reage sekvigis eksterordinaran kulturan disfloradon, periodon konatan sub la nomo *Dua Or-Epoko*. Eĉ pli, kontraste kun la t.n. *Ora Jarcento* —la XVII-a (Cervantes, Lope de Vega, Góngora, Quevedo, Calderón, Velázquez, El Greco...)—, kun preskaŭ nur belarta brilo, propras al la *Dua Or-Epoko* la plureco de la universaligoj: belarta, filozofia, sciencia... Eĉ politika, kun promespuna turnopunkto: la Dua Hispana Respubliko, proklamita en 1931, kiun la ĉiopova reakciularo ade sapeis ĝis la starigo de la intercivitana milito (1936-1939).

Tielas la kulturo-buljono, el kiu kristaliĝis la *Generacio de '27*: Pedro Salinas, Jorge Guillén, Gerardo Diego, Rafael Alberti, Dámaso Alonso, Vicente Aleixandre —nobelpremiito—, Luis Cernuda, Emilio Prados, Manuel Altolaguirre... Kaj Federico García Lorca. Neripetebla konstelacio de unuarangaj poetoj. Sian talenton kaj kreivon ili disvolvis surbaze de konstanta labor-disciplino, konstanta mempostulo, rigora elpurigo de lingva kaj tema balasto... Tiaj laboristoj super la verso aliĝis al eŭropaj renovigaj eksperimentoj —pura poezio, surrealismo, sociala poezio—, tamen ne senkondiĉe, sed penante ilin adapti al la hispana spirito. Tiaj modernaj lirikistoj sciis gustumi kaj reprodukti la eskvizitan likvoron de la tradicia hispana liriko. Tiaj sentivaj intelektuloj ligitaj al sia epoko sciis akordigi la altan dimension de sia arto kun la aspiroj de la popolo, meti la poezion je la servo de la popolo, kiam tiu falis en la faŭkon de faŝismo.

Pro ĉio ĉi svarmas en kaj eksterlande fakulaj analizoj kaj antologioj pri la *Generacio de '27*. Frapas, tamen, la fakto, ke la



ĝenerala poezi-ama publiko ekster Hispanio tute ne —aŭ nesufiĉe— konas ĉi apogean poet-grupon, supozas la fenomenon Lorca izolita, fontinta el spontana generado. Ne tielas, kiel ni ĵus vidis. Bedaŭrindas sed kompreneblas. La figuro kaj la verkaro de la universala andaluzo eklipsas ajnan splendon. Proverbas lia arta proteismo. La irlanda hispanisto Ian Gibson epitetas lin “unu el la artisme plej natur-dotitaj estoj el la hom-historio”<sup>5</sup>. Efektive, kunvivas ĉe Lorca la genia lirikisto kaj la superba dramaturgo; la sobra-stile perfekta rapsodo kaj la revolucia reĝisoro; la sorĉa preleganto kaj la pasia folkloristo... Lorca ekvojis sur la belartaj regionoj kiel pianisto kaj iĝis la mir-infano de Granado. La majstro Falla asertis: “Bele, se mi versus tiel artisme kiel Federico pianas!”<sup>6</sup>. Liajn desegnojn Joan



Miró kvalifikis “verkaro de poeto”, kio konsistigas, laŭ la pentristo, la plej bonan laŭdon fareblan al plastika esprimo<sup>7</sup>. Sed super ajna konsidero verŝajne lokindas lia persona magnetismo, tia magio el li emaninta, kapabla fascini ĉiujn, kiuj lin aŭskultis. En Hispanio, en Usono, en Kubo, en Argentino... Panegiras la kino-reĝisoro Luis Buñuel en sia memrorlibro *Mia lasta suspiro*: “El ĉiuj miaj ĝisnunaj konatoj Federico rangas la unua. Mi ne parolas pri lia teatro nek pri lia poezio. La ĉefverko estis li... Jen ĉe piano interpretante Ŝopenon, jen improvizante pantomimon aŭ mallongan teatran scenon, li estis nerezistebla”<sup>8</sup>.

Tiuspeca ĝenerala akordo pri la personeco de la granadano troveblas ankaŭ rilate lian verkaron. Magio: jen ree la kleo. Tradicio kaj avangardismo: jen la miraklo far la tuta *Generacio de '27*, majstre plenumita de Lorca. Ekzistas ĉe nia totala poeto, uzinto de revoluciaj teknikoj laŭ la mezuro de la esprim-bezonoj, ia epidermo kaj ia dermo, nome ia perspektivo tuj alirebla, tuj asimilebla pro sia bela dozo da popol-diroj, andaluzaj kanto-pecoj ktp apud jarmila substrato, al kiu li venis per vojoj ne strikte literaturaj —kiel, ekzemple, la folkloro—, kie pulsas primitivaj eĥoj, ĉiamaj zorgoj de la homaro, senĉese viglaj en ties kolektiva nekonscio. Densa substrato, kie la simbolo kaj ties kulmino, la mito —mito egalas al sakrala modelo—, popolas la Lorca-ajn tekstojn per signiferoj ne eksplicitaj sed kapablaj estigi vibrajn sugestiojn. Tiele la luno, la sango, la taŭro, la tranĉilo... akiras mitan valoron en la Lorca-a universo. Kaj ĝuste tie, en tia enradikiĝo kultura kaj transhistoria, en tia perspektiva disduiĝo staras la ŝlosilo por klarigi la universalecon de la genia andaluzo. Ĉar la hispana publi-

ko identigas sin kun liaj populare vestitaj elplumaĵoj spite al ties substanca komplekseco —gongorismaj bildoj, songaj elementoj, surrealismaj formuladoj...—, kaj ajnlatituda beletr-amanto sentas sin ravita antaŭ ia arto, kiun lia nekonscio rekonas, malgraŭ ke ĝi disvolviĝas en profunde hispaneca kadro.

García Lorca tiel atingas kion nur malgranda nombro da elektitoj de la muzoj sukcesas gustumi: fervoran agnoskon kaj el la erudiciuloj kaj el la simpla popolo. Kaj tion li bonŝance spertis mem dumvive. De 1928 ĝis 1936 aperis en Hispanio kvin eldonoj de lia *Cigana romancaro*, entuziasme akklamitaj de legantoj el plej diversaj kulturaj tavoloj. Senprecedenta furorado. Dum la kritikistoj surtronigis la poeton, la popolo recitis liajn romancojn. En 1933 kaj 1934 liaj dramoj *Sanga nupto*, *La mirinda ŝuitedzino* kaj *Mariana Pineda* ricevis apoteozon en Argentino...

Ja ĉi faktoj dementas per si mem la perversajn objektojn pri la aŭtenta kvalito de García Lorca, kiujn lanĉis la partio de liaj murdintoj, sendube kun la intenco remurdi lin postmorte. Nun la verkaro de nia multregistra artisto ĝuas universalan admiron. Verkaro produktita en nur dek ok jaroj. Verkaro, kiu planedas ĉirkaŭ la frustracio. Tia obsedo projekciigas sur duoblan planon: ontologian-socian kaj metafizikan-historian, parte kiel reflektado de la ĝis antaŭ nelonge diskutata samseksemo de la poeto, sed, ĝenerale, kiel esprimo de liaj angoro kaj teruroj antaŭ la enigmoj de la mondo kaj la ekzistado. Lorca, revoluciulo sen politika membro-karto, kantis la rajton de ĉiu individuo al sia propra vivo, al mastrado de sia propra destino: al la libero. Depostulis teneron kaj “la Amon, kiu disdo-

nas ĝojo-kronojn". Abomenis tiranecon, subpremado kaj dogmojn. Ĉiam enviĝis inter la senpovaj —“mi apartenas al la partio de la malriĉuloj—, inter la marĝenuloj. Tial oni mortigis lin. Kaj tial li transvivas sin super sia murdiĝo.

Somere de 1936 la sinkroneco de Hispanio kun la ekstera mondo montris sin efektiva ankaŭ sur la tereno de la violento. Tiam la Iberan duoninsulon enpenetris la universala historio, stampita de la nazia vandalismo, kiu renversis la germanan kulturon, rolintan kiel modelon por la hispanoj responsaj pri la spirita universaligo de Hispanio. Ĉi lando staris tiam sur la plej alta pinto de sia moderna kultura historio. Ĉi-kaŭze la ĉio-detrua militista puĉo kontraŭ la Dua Hispana Respubliko kaj la sekva intercivitana milito fulme akiris esceptan eĥon ĉe la internacia komunumo universitata kaj art-ama. Ĉi-kaŭze eminenta viktimo, Federico García Lorca, simbolo de la miloj da senkulpaj hispanoj kruele oferitaj tiukadre, transiĝis tuj al unu el la tragikaj paradigmoj de la historio ĉi-jarcenta. “Sed okazis tiel, ĉar Lorca, jam antaŭ 1936, estis unu el la plej emblemaj hispanoj el la *Dua Or-Epoko* (1898-1936)”<sup>9</sup>.

Miguel Fernández

## GLOSOJ KAJ NOTOJ

### (1) - Lorca-a bibliografio en esperanto:

a) Verkoj tradukitaj: *Cigana romancaro*, Tra Fernando de Diego, Stafeto, La Laguna, 1971; *Sankta nupto kaj La domo de Bernarda Alba*, Trad. Miguel Fernández, n-ro 23 de la kolekto *Oriento-Okcidento*, La Misma, Madrid, 1987; *Sankta nupto*, Trad. Miguel Fernández, n-ro 7 de la kolekto *Hispana Literaturo*, Hispana Esperanto-Federacio, Madrid, 1998; kun la titolo *Federico García Lorca, liriko*, kaj en traduko de K. Gusev, aperis broŝuro kun poemoj de FGL, Komisiono pri internaciaj ligoj de sovjetaj esperantistoj, Moskvo, 1968.

b) Originala cseco pri la poeto: Miguel Fernández, *Sur la spuroj de Federico García Lorca*, Universidado de Santiago de Compostela, 1996.

(2) - Marcell Auclair, *Enfances et mort de Federico García Lorca*, Scuil, 1968, p. 37.

(3) - Sensuala = Sens-ama. (H. Vatré, *Neologisma glosaro*).

(4) - Sinestezio: Vort-figuro, kiu asocias al iu senso sensacojn proprajn al alia senso.

(5) - Ian Gibson, *Vida, pasión y muerte de Federico García Lorca (1898-1936)*, Plaza y Janés, Barcelona, 1998, p. 11.

(6) - Claude Couffon, *Granada y García Lorca*, Losada, Buenos Aires, 1967, p. 29.

(7) - Ĉerpita el Miguel García-Posada, *La casa de Bernarda Alba*, Castalia, Madrid, 1983, p. 18.

(8) - Luis Buñuel, *Mi último suspiro*, Plaza y Janés, Barcelona, 1982, p. 154.

(8) - Luis Buñuel, *Mi último suspiro*, Plaza y Janés, Barcelona, 1982, p. 154.

(9) - Juan Marichal, *Lecciones sobre Federico García Lorca*, Comisión Nacional del Cincuentenario, Granada, 1989, p. 22.





# Lingva angulo

## LINGVA ANGULO 5

de Antonio Valén

### PRI LANDNOMOJ KAJ INOJ

Ĉio homa estas nature neperfekta, kaj kompreneble ankaŭ nia komuna lingvo havas certajn mankojn. Mi volas priparoli frapan konstru-trajton de esperanto, kvankam eble temas nur pri malgrava detalo, sed mi unue avertu: 1) mia takso ja subjektivas; 2) temas pri nura detalo, ĉar fundamentaj mankoj maltaŭgigus esperanton kiel helplingvon por internacia komunikado; 3) la ĝisnuna evoluo de nia lingvo allasas modifadon aŭ eliminadon nur tra la vojo de la natura evoluo.

Estas du manieroj nomi landojn en esperanto: jen oni eltiras la nomon de lando el ties popolanoj (**hispan'o** = *español*; **Hispan'i'o** aŭ **Hispan'uj'o** = *España*); jen oni eltiras la nomon de la popolanoj el ties lando (**Kanad'o** = *Canadá*; **kanad'an'o** = *canadiense*). En la unua kategorio rangas la "malnovaj" popoloj (Eŭropo, parto de Azio kaj Egiptujo), kaj en la dua kategorio sidas la "novaj" popoloj, naskiĝintaj post la kreado de ŝtato (Ameriko, Afriko, Oceanio kaj parto de Azio). Jen divido ne nur arbitra kaj maljusta, sed ankaŭ paradoksa. Ekzemple, Ĉinio kaj Japanujo apartenas al la unua kategorio (**ĉin'o** = *chino* - **Ĉin'i'o**, **Ĉin'uj'o** = *China*; **japan'o** = *japonés* - **Japan'i'o**, **Japan'uj'o** = *Japón*), sed Koreio -lando evidente "malnova" - apartenas al la dua (oficiale: **Kore'o** = *Corea* - **kore'an'o** = *coreano*).

Fakte, la koreaj esperantistoj neniam ŝatis tian "diskriminacion" kaj do diradas **kore'o** = *coreano* - **Kore'i'o**, **Kore'uj'o** = *Corea*. La plej konata korea revuo en esperanto nomiĝas ĝuste kaj juste **La espero el Koreio** (= *La esperanza de[sde] Corea*). Kurioze, ankaŭ en la hispana ekzistas tiaj duoblaĵoj, ekzemple *Estonia -estonio* aŭ *estoniano*, *Ucrania -ucranio* aŭ *ucrania* -no k.a.

Ni jam vidis, ke du afiksoj taŭgas por nomi la "malnovajn" landojn: **-uj-** (klasiĉe: **Hispan'uj'o**) kaj **-i-** (neologisme: **Hispan'i'o**), ambaŭ surbaze de la popol-nomo (**hispan'o** = *español*). La *i*-formo regas en la parola lingvo, sed en la skriba lingvo legeblas duone *i*-formoj, duone *uj*-formoj.

En la vorto **Ĉin'i'o** (= *China*) kuniĝas du fenomenoj: la unuan ni jam klarigis (la neologisman *i*-formon por nomi landojn), kaj la dua estas la forta evolu-tendenco **ĥ** **k** (variaĵo: **ĥ ĉ**). Tia emo manifestiĝis jam en la komencaj vivo-jaroj de esperanto, kaj en 1921 la Lingva Komitato -patro de la nuna Akademio de Esperanto-aprobis la anstataŭon de **ĥ** per **k** en kelkaj kunteksto. Nuntempe oni emas apliki la anstataŭon al ĉiuj kunteksto, nome **arĥetipo** **arketipo** (= *arquetipo*), **arĥivo** **arkivo** (= *archivo*), **ĥameleono** **kameleono** (= *camaleón*), **ĥemio** **kemio** (= *química*), **teĥniko** **tekniko** (= *técnica*) ktp. La vorto **ĉin'o**

(*chino*) specialas, ĉar ĝi naskiĝis el **ĥin'o**. Oni atendus evoluon al **kin'o**, sed ĉi formo ne eblas (**kin'o** = *cine*). La dua eblo (**ĥi ĉ**) rezultigis la vorton **ĉin'o**. Tial en **Ĉin'i'o** (= *China*), el la malnova formo **in'uj'o**, kuniĝas la du evolu-fenomenojn -uj- -i- kaj **ĥi k** (variaĵo: **ĥi ĉ**).


Fakte, nur la formon **Ĉin'i'o/Ĉin'uj'o** ĉiuj uzas en nia lingvo. La plej disvastigata ĉina revuo en esperanto titoliĝas **El Popola Ĉinio** (= *Desde China Popular*).

La vorto **ĥor'o** (= *coro*) pruvas la fortan evolu-tendencon **ĥi k**: la "normala" evoluo ne eblis, ĉar **kor'o** = *corazón*; la duan eblon, \***ĉor'o**, proponis Zamenhof mem, sed ĝi tute ne enradikiĝis; tria iom stranga eblo **ĥi h** same ne eblis, ĉar **hor'o** = *hora*. Kio do restis? Nur la rekreo de la vorto **ĥor'o** surbaze de la latina nominativo **CHORUS korus'o**: nur evitado de la fonemo **ĥi** pravigis la ĉirkaŭvojon.



La Estraro de HEF esprimas al la membraro sinceran bondeziron por la nova jaro. Feliĉon kaj sukceson en via Esperanto-agado.

(1) La lasta oficiala aldono de la Akademio proponas -inter aliaj arbitraĵoj- la formojn *Egipto-egiptanoj* anstataŭ la tradiciaj *Egiptio, Egiptujo-egiptoj*. Tiujn formojn mi rigardas André-Albault-ismoj, laŭ la nomo de la akademia prezidinto.



ABONU KAJ ABONIGU

EL POPOLA

**ĈINIO**

Abontarifo por 1999

**5.100 ptoj**

12 numeroj jare. 52 paĝoj ĉiunumere. Informoj pri la E-movado tra la mondo. E-rubrikoj. Aktualaj raportoj kaj artikoloj pri Ĉinio.

Sendu poŝtmandaton al Felix Gómez Martín  
c/ Corbeta 8, 5A; 28042 Madrid; Tel: 91-7472378

aŭ al via kutima peranto



## Kampanjo 2000 de Eurokka

Okaze de la 10-jariĝo de EUROKKA kaj kunlaborado kadre de Kampanjo 2000, VINILKOSMO (la diskeldonejo de EUROKKA) prezentas sian "Kolekto 2000". Ĝus aperis la du unuaj KD-oj kiuj estas parto de la kompaktdiska kolekto kiu startis en Majo 1998 kaj daŭros ĝis jaro 2000 aŭ 2002. Laŭplane dum tiu periodo aperos serio de minimume dek 6- ĝis 8-titolaj KD-oj el diversaj E-istoj. La du unuaj KD-oj de la kolekto oficiale prezentigis en la 83a Universala Kongreso en Montpeliero, okaze de la koncertoj de "Jacques Yvart" (lia KD tiel sukcesis dum la UK ke oni pretigas duan eldonon), kaj de "JoMo" (bedaŭrinde la pluvo bojkotis la koncerton en kiu JoMo devis prezenti sian KD-on).

Pere de Kolekto 2000 EUROKKA volas substreki ke vivanta E-kulturo kiel muziko estas unu el la plej gravaj elontroj de ekzisto kaj realo de Esperanto por e-istoj kaj nee-istoj. Kolekto 2000 ankaŭ pravas ke e-muzikkulturo estas tre diversa, riĉenhava, alt-kvalita kaj valora, same kiel ajna alia nacimuzika kulturo.

Esperantistoj uzu, disvastigu, disaŭdi-gu ĝin por varbi por esperanto kaj por memkulturigi. Por tion fari petu de EUROKKA, Vinilkosmo-katalogon kun mendilo, Rok-gazet' —abononilon, ktp... La subteno de tiu agado multobligos ĝian efikon.

La KD de JoMo iom malfruis, ĝi enhavas 8 titolojn de pure rokenrola muziko kun liberecanaj tekstoj (pri ukraina kaj hispana revolucioj kaj pli aktualaj sociaj temoj). La KD de Ĵak Yvart enhavas 6 tradukitajn kanzonojn de la fama franca kantisto Georges Brassens. Efektive Jacques Yvart siatempe amikiĝis kun Georges Brassens kaj Jacques dediĉas tiun diskon al la granda majstro (liva foto). La rezulto estas tute profesikvalita.

Nun eblas antaŭmendi la sekvantajn KD-ojn unu post aliaj laŭ la ritmproduktado por 69FrF + sendokostoj. Eblas ankaŭ aboni la tutan kolekton por 600FrF + Sendokostoj. Sed eblas mendi la KD-ojn post apero por 79FrF + sendokostoj, same kiel ĉi du unuaj.

Pluraj artistoj kaj bandoj sin proponis por la sinsekve aperontaj diskaj: Persone, La Kompanoj, Kajto, Solotronik, La Mevo, Ĵomart & Nataŝa, ktp...

Floréal Martorell

# JARABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 1999

## Hispana Esperanto-Federacio

Abonantoj el eksterlando. . . . . NLG 53

(Por hispanoj vidu sur la 30a paĝo)

## Universala Esperanto-Asocio

Individua Membro kun Gvidlibro (MG) . . . . . 1.000

Individua Membro kun Jarlibro (MJ) . . . . . 2.500

Individua Membro plus abono al E-o (MA) . . . . . 6.250

Simpla abono al Esperanto, sen membreco (SA) 4.000

Simpla abono al Kontakto, sen membreco (Kto) 2.400

Societo Zamenhof, sen membreco en UEA (SZ) 12.500

Rim: La kategorio (MG) ne rajtigas rabaton en la UK.

La kategorioj MJ kaj MA inkluzivas por la junuloj (ĝis 29 j.) membrecon en TEJO kaj ricevon de Kontakto.

**Eventoj** . . . . . (Rete: 45 NLG), (aere: 6.450) 5.550

RET-INFO (antaŭe nomata Ret-eventoj) . . . . . 3.375

[P] HEF.

**KAE-Informilo** . . . . . 1.000

**La Gazeto** . . . . . 3.500

**Heroldo de Esperanto** . . . . . 3.950

**Literatura Foiro** . . . . . 4.240

**Internaciisto** . . . . . 3.950

[P]: Luis Serrano; C/ Font Nova, 32; 08202 Sabadell;

Tel. (93) 727 50 21; Caja Postal 2813 0146061.

**Monato** . . . . . (aere, 5.840) 5.000

**La jaro** . . . . . (aere 1.030) 750

**Literatura Foiro** . . . . . 4.200

**La Ondo de Esperanto** (12 numeroj jare) . . . . . 3.625

[P]: Juan Azcuénaga, Gral Dávila, 127, portal 7, 2 I;

39007 Santander. Caja Postal n-ro 3548531

**Kajeroj el la Sudo**. (Trimonata) . . . . . 1.000

[P]: José M. Bernabeu; Primo de Rivera, 8; 03360 Ca-

llosa de Segura (Alicante). Caja Postal 28.09.722.429.

**El Popola Ĉinio** . . . . . konsultenda

[P]: Felix Gómez; Corbeta 8, 5A; 28042 Madrid.

**Rokgazet'**. Kvar numeroj . . . . . 100 Fr. F (15,09 eŭroj)

## KIEL PAGI ABONON

Post enkontigo de la koncerna sumo, sendu ĉiam kopion de la pag-pruvilo kune kun noto klariganta la kialon de via pago, tio estas kion vi volas aboni, al la koncerna peranto. Atentu ke ne agi tiel, povus kaŭzi problemojn.



Iñaki Velcz

## Librotago

Por instigi al legado de libroj en la Internacia Lingvo, kaj okaze de la "Esperanta Librotago" kaj de la tradicia jul-festo (fino de jaro kaj komenciĝo de alia), la Libroservo de HEF donacos al ĉiu mendanto, de la 15a de decembro de 1998 ĝis la 15a de januaro de 1999, *rabatkuponon*, kies valoro estos 10 elcento de la aĉetitaj varoj.

La posedanto de *rabatkupono* rajtas depreni ĝian valoron de la kosto de estonta mendo, laŭ la kondiĉoj klarigitaj sur la kupono.

Okazon kaptu ĉe la kapo, ĉar la vosto esta glita...

Libroservo de HEF

Apartado 119

47080 Valladolid

Tel: 983-26-00-86

# Aniĝilo por 1999

(Foto)kopiu kaj poŝtu aŭ faksu al la HEF-oficejo. Bv. skribi klare.

### Personaj datenoj :

Kompleta nomo : ..... Annumero: .....  
 Adreso : .....  
 Poŝtkodo kaj urbo : .....  
 Tel. : ..... Naskiĝdato : ..... Retadreso: .....

### Aniĝo :

- OM ordinara membro ..... 4.100 ESP - 24,55 EŬR
- kun junulkarto ..... 3.700 ESP - 22,16 EŬR
- PM patrona membro ..... 8.200 ESP - 49,10 EŬR
- KM kolektiva membro ..... 8.200 ESP - 49,10 EŬR
- EM (nur por jamaj EM-anoj 1995e) ..... 3.300 ESP - 19,76 EŬR

Ĉiu ano ricevas *Boletín*; infanoj ĝis 12 jaroj *Juna Amiko*; junuloj inter 13 kaj 30 jaroj, *Kontakto* kaj *Koncize*. PM-anoj ricevas 5-centonan rabaton je mendoj de libro-servo kaj je abono al *Eventoj*, *Esperanto* kaj *Kontakto*.

### Pagmaniero :

- Bankordone (nur por aniĝo; plenigu la malsupran formularon).
- Elspezo en konton 14.011.966 de Caja Postal (kunsendu spezilón).
- Ĉeko por "Federación Española de Esperanto" (aldonu 375 ESP).
- Elspezo en la konton hefb-m de U.E.A. (kunsendu ĝirilkopion).

Dato :

Subskribo:

## DOMICILIACIÓN BANCARIA

Banco o caja: .....

Dirección: .....

Código postal y localidad: .....

C.C.C.:

entidad sucursal D.C cuenta

Muy señores míos:

Les ruego atiendan con cargo a la cuenta arriba indicada los recibos que les sean presentados por la Federación Española de Esperanto en concepto de cuota anual, hasta nueva orden.

Fecha:

Nombre y firma del titular:

# Loĝado

## 58a Hispana Kongreso de Esperanto

31

Informo pri la eblec-loĝado dum la venonta Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Castellón, inter la 17a kaj la 21a de julio 1999.

Atentu: *oni rezervos lokojn kun tiel favoraj prezoj nur al homoj kiuj jam aliĝis kaj pagis la kongreskotizon.*

1.- HOTEL INTUR (4-stela): Loko en dulita ĉambro: 6.500 pesetoj. En unulita: 9.000, ambaŭ kun matenmanĝo.

2.- HOTEL JAIME I (3-stela), en la urbocentro: Loko en dulita ĉambro: 5.500 pesetoj. En unulita: 8.100, ambaŭ kun matenmanĝo.

3.- HOTEL RESIDENCIA DOÑA LOLA (2-stela), tre proksima al la kongresejo: Loko en dulita ĉambro: 4.300 pesetoj. En unulita: 6.000, ambaŭ kun matenmanĝo.

4.- HOTEL MASSER (2-stela), en la urbocentro: Loko en dulita ĉambro: 4.000 pesetoj. En unulita 4.300. SEN matenmanĝo.

5.- RESIDENCIA DE ESTUDIANTES MIRAMAR (proksima al la kongresejo). Tre komforta. Loko en dulita ĉambro, KUN matenmanĝo: 3.000 pesetoj.

6.- RESIDENCIA BANCAJA: Tre komforta. Loko en dulita ĉambro, SEN matenmanĝo: 1.900 pesetoj.

7.- DIVERSAJ PENSIONOJ EN CASTELLÓN: Loko en dulita ĉambro: 2.100 pesetoj. En unulita: 2.300. En dulita con bankuvo: 2.400. Ĉiuj SEN matenmanĝo. La unuaj rezervontoj ricevos plej komfortajn kaj proksimajn lokojn.

8.- ALBERGUE MUNICIPAL DE VILLAREAL (vilaĝo 7 kilometrojn for de la kongresejo, komforta): Loko en dulita aŭ en trilita ĉambro: 800 pesetoj, SEN matenmanĝo. Se ne estos sufiĉe da mendoj oni devos nuligi ĉi tiun lokon.

Dum labortagoj eblas tagmanĝi ĉe la kongresejo, mem sufiĉe malmultekoste. Dimanĉe oni preparos por la kongresanaro gigantan paclon, por tagmanĝi, senpage, kaj pro tio oni ne bezonas serĉi restoracion tiutage.

Nepras antaŭpagi la loĝadon. Post la 1a de majo aldonu 10% al la tuta kosto. Post la 1a de junio la LKK ne certigas rezervon. Se iu deziras resti pli da tagoj, bonvolu informi detale, por bone organizi la rezervon. Kiu volas okupi lokon en dulita ĉam-

Nomo..... Urbo .....

Adreso.....

Kongresa numero..... Dato .....

Mi pagas: Por loĝado, ( ) noktojn, en loĝejo numero ( )

En unulita ĉambro ( ); En dulita ĉambro ( ) Entute ..... ptoj

Mi deziras dividi ĉambron kun kongresano numero ( )

Post la 1a de majo 1999 aldonu 10% al la tuta sumo

Post la 1a de junio 1999 la LKK ne garantias loĝadon





# 58a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

CASTELLÓN, 17a—21a DE JULIO 1999

Kongresejo: Facultad de Ciencias Jurídicas y Económicas. Universidad "Jaime I",  
Campus de Riu Sec. Castellón

ALIĜILO N-RO.....

(BONVOLU SKRIBI TAJPE AŬ PRESLITERE)

Familiaj nomoj .....  
 Antaŭnomo, s-ro/s-ino/f-ino (1) .....  
 Aĝo (2) ..... Profesio (2) .....  
 Adreso .....  
 Urbo ..... Poŝtkodo .. Provinco .....

Mi aliĝas al la 58a Hispana Kongreso de Esperanto kaj sendas per poŝtmandato, ĉeko aŭ  
banko la jenan sumon:

Kongreskotizoj: .....	ĝis la 1a de majo, ptoj .....	poste, ptojn
Kongresano 1 (ne HEF-ano) .....	3.500 .....	4.000
Kongresano 2 (HEF-ano) .....	3.000 .....	3.500
Kunulo de Kongresano 1 .....	3.000 .....	3.500
Kunulo de Kongresano 2 .....	2.500 .....	3.000
Membro de grupo (min. 15-persona) .....	2.500 .....	4.000

Donacon .....  
 ENTUTE: .....

Plenigu apartan aliĝilon por ĉiu familiano samtempe aliĝanta

(1) Forstreku la nevalidan; (2) Nur por statistiko

Sendu la monon al Caja de Ahorros del Mediterraneo (CAM), Avenida Rey D. Jaime,  
74; 12001 Castellón; cuenta "58 Congreso Español de Esperanto"; n-ro: 2090 0327 13  
0000139612, kaj samtempe la aliĝilon kaj kopion de la konfirmo de la pago al la  
Kongresa Sekretario; Av. Burjasot 29, A-31; 46009 Valencia.

**Por bankĉekoj kaj poŝtmandatoj aldonu 10%**

KOTIZO ESTAS PERSONA. ĜI NE ESTAS REPAGEBLA.

Pago ricevita

Konfirmilo sendita

Loĝejo mendita


<sup>2</sup>  
**15a de decembro**

**Libro-tago  
Zamenhof-tago**



## **Perkoresponda Kurso**

*Li estas  
tiel alta  
kiel mi*



Lernolibro: Esperanto, curso del idioma internacional; ekzercaro (presitaj aŭ en diskedo); informlibro: El Esperanto: fenomeno de la komunikación; vortaro Lexicón Sopena; kasedo kaj la gvido de kompetenta instruisto jen telefone, jen fakse, jen per normala aŭ elektronika poŝto.

**nur 14.900 ptojn\***

Ĉiu kursano ricevos senpage dum unu jaro la koncernajn publikigaĵojn de la Asocio: Boletín, Juna Amiko, Konkize kaj Kontakto.

Mendu ĝin ĉe HEF, Rodríguez San Pedro 13-3-7a, ES-28015 Madrid.  
Tel+Faksilo: 34(9)1-4468079; admin@esperanto-es.org

\* Remburse plus sendokostoj. Gejunuloj kun "Carnet Joven" ricevas 10 elcentan rabaton.